pdf.iompostiom.net 014

internacia reta printebla gazeteto – kompostita el retaj fontoj – por sur la tablo en esperantaj medioj

Tutmonde

Japana ministro sinmortigis

Legu la plenan artikolon en raporto.info

Laŭ informoj de pluraj japanaj amakskomunikiloj: NHK, Mainichi Shimbun je la 28-a de majo 13:18 (UTC+9), oni trovis ke **Matsuoka Toshikatsu**, la Japana Ministro pri Agrikulturo, Forstokulturo kaj Fiŝado penduminta sin ĉe la Pensiono por parlamentanoj (Akasaka, Mitano-kvartalo, Tokia Metropolo). Matsuoka estis portita al la Filia Malsanulejo de Keio-Gijuku-Universitato. Je la 2-a horo, oni konstatis ke li estas morta. La opoziciaj partioj, iuj membroj de regpartioj persekutis lin pro korupta skandalo.

Movade

Vikipedio kreskas kiam Antverpeno festas

Legu la plenan artikolon en Libera Folio

Dum la centjariĝa festo de la loka Esperanto-klubo en Antverpeno oni rigardis ne nur malantaŭen. Okazis prelegoj pri tri gravaj interretaj projektoj, kaj praktika trejnado pri redaktado de la reta enciklopedio Vikipedio. La organizintoj de la prelego kaj seminario pri Vikipedio, Chuck Smith kaj Yves Nevelsteen, konstatis ke ĝenerale daŭras longe konvinki homojn ke libere redaktebla enciklopedio povas funkcii. Por multaj esperantistoj redaktado de artikoloj en Vikipedio tute ne estas per si mem klara, tial utilas la nova manlibro kaj la volontulaj teknikaj helpantoj.

Informe

10a Internacia Fotokonkurso

Informoj prenitaj el esperantujo.org

Post naŭ sukcesaj konkursoj (1998–2006) la redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al partopreno en la deka Internacia Fotokonkurso. En la fotokonkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj. - Legu la Regularon de la Fotokonkurso en la novaĵrubriko de “La Ondo” http://www.esperanto.org/Ondo/

Redakcie

Lernejo, kaj mi petas helpon

Saluton karaj legantoj,

Daŭris longe ĝis ĉi tiu numero aperis, pardonu min pro tio. Mi ja estas normala (nu, ĉu tute normala...?) studento kiu libertempe kaj eĉ lernejtempe kunmetas ĉi tiun gazeteton, tute sen aliaj celoj ol kontribui al la Esperanta mondo. Do, pro tro da lernejaj devoj de nun pdf.iompostiom.net aperos iom malpli ofte. Ĝi nepre ne malaperos! Ĉu vi ŝatas ĉi tiun gazeteton? Bone! Eble vi povas helpi ankaŭ fojfoje kunmetante gazeton. La fontdosieroj (en formato ODF, de OpenOffice.org) estas libere haveblaj en la retejo sub la ligiloj '#' kaj adapteblaj.

Ĝis poste! Joop Kiefte // LaPingvino